

Temo: Malklaraj kondiĉoj de la ĵuse elektita estraro kaj propono okazigi novajn elektojn

Karaj Komitatanoj,

Por komenco mi ŝatus diri kial estas intencita la propono. Mi simple nur ŝatus, ke la elektoj de la estraro estu honestaj, sen iuj flankaj suspektindaj kondiĉoj, sen surprizoj por iuj el kandidatoj. Pro tio mi kuraĝas kontraŭstari elektojn, kiuj okazis dum IJK en Wiesbaden. Mi vin ĉiujn petas, forgesu nun pri la viaj (mal)preferoj al kandidatoj, kaj pripensu, ĉu la elekto estis honesta por ĉiuj flankoj, sed pensu ankaŭ pri tio, ĉu konsekvencoj de la lastaj elektoj ne tro komplikigos aferojn ene de TEJO. Mi vidas en la akcepto de la propono rebonigon de la situacio en la organizo.

Nun pri la elektoj en Wiesbaden. Tiuj, kiuj estis en IJK aŭ jam aŭdis klaĉojn de tie, scias, ke en la nokto antaŭ la elektoj aperis propono pri nova kandidato por prezidanteco. Ĝi estis motivigita jene:

Ni, la subskribantoj,

konstatante, ke en la nuna estraro estas du estraranoj pretaj kaj kapablaj (re)igi prezidanto, Łukasz Żebrowski kaj Michael Boris Mandirola,

rimarkante, ke laŭ la propono de la elekta komisiono estos nur unu kandidato por la posteno de prezidanto,

kalkulante, ke la nuna prezidanto jam finis du oficperiodojn,

legante, ke la nova statuto proponita de tiu ĉi estraro malpermesos pli ol du sinsekvajn oficperiodojn kiel prezidanto,

insiste petas, ke dum tiu ĉi komitatkunsido

*Michael Boris Mandirola ankaŭ kandidatiĝu por la posteno de prezidanto,
Łukasz Żebrowski ankaŭ kandidatiĝu por la posteno de alia estrarano,*

por ke estu elekteblo por tiu ĉi komitato.

kaj tiel prezentita al la Komitato tuj antaŭ la elektoj. Teorie do ĉio ŝajnas esti en ordo, sed ne nepre estas tiel se oni rigardas detalojn. Plej unue, la proponata nova statuto ne vere povas esti motive por ĉi tiuj elektoj, ĉar ĝi estas nur propono kaj eĉ se estus akceptota, ne validus por ĉi tiu elekto. Sed eĉ se oni volus prezenti tiun argumenton laŭspirite, tiam daŭre estas pluraj aferoj rimarkindaj:

1. La propono de la statuto ne venis de la malnova Estraro de TEJO, sed de la komisiono starigita de la Komitato de UEA.
2. En la propono de la nova statuto, kiun tiu komisiono prezentis al la Komitato de UEA antaŭ la 100-a Universala Kongreso en Lillo, estis neniu mencio pri la limigo de la senĉesa prezidanteco ĝis maksimume du oficperiodoj.
3. Principe, la propono de la nova statuto ne celis enhavajn ŝanĝojn, ĉar tiujn ja devus unue aprobi la Komitato de TEJO, sed nur restrukturigon de la dokumento kaj ĝian konformigon al la nederlanda leĝaro, tiel ke TEJO povu labori kiel sendependa organizo. Pro tio en la dokumento oni povas trovi jenajn kategoriojn de teksto:

nemarkita = teksto kopiita senŝange el ĉapitro "Statuto" de malnova Regularo pri TEJO.

rozkolora = aldonita por strukturigi la dokumenton

verda = aldonita por kompletigi minimuman enhavon de asociaj statutoj laŭ Nederlanda juro.

flava = ŝovita el alia ĉapitro de la malnova Regularo pri TEJO

4. Dum la 100-a Universala Kongreso en Lillo pri la dokumento laboris plia laborgrupo en kiu, de la antaŭa TEJO-estraro membris Michael Boris Mandirola kaj Veronika Poór. En tiu tempo en la projekto (ĈAPITRO 5: ORGANOJ KAJ REPRESENTADO; 13. Ĉefaj organoj) subite aperis nova punkto:
(6) Prezidanto ne rajtas ofici dum pli ol du sinsekvaj oficperiodoj kaj je la fino de la dua oficperiodo devas retiriĝi el la prezidanteco por almenaŭ unu oficperiodo.
5. Ĉi tiu punkto estas evidente enhava ŝanĝo, kiu ja ne devus subite aperi en tiaj cirkonstancoj, sed devus esti iniciatita de la Komitato de TEJO.
6. En la dokumento prezentita al la komitatoj de UEA kaj TEJO ĉi tiu nova punkto tute ne estas markita, kio, laŭ la klarigoj en la komenco, signifas, ke ĝi devus aparteni al la kategorio " teksto kopiita senŝange el ĉapitro "Statuto" de malnova Regularo pri TEJO. " kievidente ne veras.
7. Manko de markado de tiu ŝanĝo aldone kaŭzas, ke eĉ tiuj en la Komitatoj de UEA kaj TEJO, kiuj havis tempon trarigardi la dokumentojn, tre facile povis ne rimarki tiun aldonon.
8. Ne eblas ne rimarki ankaŭ, ke kvankam ne ankoraŭ valida, komprenata laŭspirite tiu ŝanĝo evidente uzeblas (kaj poste efektive uzitis) kontraŭ la kandidatiĝo de Łukasz Żebrowski, kiu jam laboris por TEJO kiel Prezidanto dum 2 oficperiodoj, dum tute ne malhelpas al Michael Boris, kiu pro sia aĝo povus havi tiun postenon ĝuste ankoraŭ dum 2 oficperiodoj.
9. La afero estas eĉ pli suspektinda, se oni rememoras, ke de TEJO en la komisiono dum UK estis ĝuste Michael Boris mem kaj Veronika Poór, kiu poste klare subtenis lian kandidatiĝon en la Komitatkunsido en Wiesbaden.

Konsiderante ĉi tiujn faktoj, spertinte la malbonan etoson en kiu okazis la elektoj kaj sciante ke pro ĉi tiuj okazaĵoj iuj kandidatoj por la Estraro de TEJO retiris siajn kandidatiĝojn, ni konstatas, ke la nuna situacio estas tre danĝera por TEJO. Ni vidas, ke la Komitato estas dividita, pluraj aktivuloj seniluziiĝintaj pro tiel malaperinta kunlabora etoso en la organizo, kiu ja ĝis nun ĉiam regis en TEJO, tiel elektita estraro ne havas kaj ne povas havi subtenon de multaj en la Komitato. Tial ni proponas, ke en nia organizo laŭeble rapide okazu nova elekto de la estraro, ĉar nur tio pova resanigi la situacion. Ni petas tuje okazigi sekretan voĉdonon pri la jena propono:

La Komitato de TEJO eksigas la Estraron de TEJO elektitan dum la 71-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO kaj taskas la Elektan Komisionon ene de du semajnoj eki retan elekton de la nova estraro de TEJO.

Subskribitaj:

Vít Guiglielmo Mišurec, komitatano A por ĈEJ

Romualda Jeziorowska, komitatano B